



Informoj:
Arto -- Literaturo
Turismo -- Sciigoj

NIA VIVO

Administracio
kaj Redakcio:
Str. RODA, n.º 14-16

MONATA BULTENO de la Esperanta Societo "FRATECO"

FUNEBROLITEROJ

Je la lasta 31^a de Aŭgŭsto, vespere, okazis ĉe nia Urbo tre plorindaj okazintaĵoj. Dum pafado inter strikemuloj kaj policanoj falis kuglovunditaj senkulpaĵaj preterpasantoj. Unu el ili, nia kunfratecano, S-ro. Isidoro Floría Sánchez, estis mortigata preskaŭ subite.

Ŝajnas al mi nekredible ke per tiel mallongaj frazoj oni povas esprimi la detruon de honora vivado plena da iluzioj celaranĝitaj kun la konfido ĉe la laboro; la senespero de bona familio tiel brute frapata de la fataleco; la vidvino de feliĉa edzino, kaj la orfeco de du belaj infanetoj kiuj, nekonante la ĉagrenojn de la vivado, rigardas tute strange la larmojn fluantajn de la okuloj de sia patrino kaj batante siajn manetojn demandas la revenon de sia patro.

FRATECO estas perdinta unu el la plej entuziasmaj anoj. La disvastigado de la lingvo Esperanto estis por li

fiksideo. Ĝiutage oni vidis lin en nia klubo laborantan, pripensantan novajn formojn por propagandilo, sed kun tiel granda optimismo, ke lia sana gajeco kaj afabla interkonsento komuniĝis

al ĉiuj, efektivigante ideojn, tiel kiel la apero de nia bulteno NIA VIVO, kio estis granda sukceso kaj portas ĉien la nomon de FRATECO.

Malfeliĉa amiko! Kian ĝojon li sentis kiam aperis la unua numero vidante aliformigata je realeco tian ideon. Neniu povis pensi ke, ĝuste, per tiu ĉi bulteno kaj, tiel baldaŭ, ni devus publikigi la tragedian morton de tiel kara samideano.

Mortinto!... kia terura vortol... sed estas necese ke oni ripetu ĝin por ke ĝia nekonfuzebla signifo konvinku nin pri tia malfeliĉo, ĉar la fataleco, kvazaŭ terura kaj neŝatigebla monstro, tiel subite forprenis nian amikon, ke malfacile enradikiĝas ĉe nia menso la ideo de tiel bedaŭrinda perdo.

F. TURRIÓN.



† S-ro. ISIDORO FLORÍA SANCHEZ
Komitatano de «Frateco» tragedie mortigita

MALAMU MORTIGON

Miaj okuloj ne verŝas larmojn. Estas mia koro kiu ploras antaŭ la homa malboneco, verŝajne, ne forigebla.

Kelkaj tagoj pasis de kiam mia kara fratecano Isidoro Floría Sánchez estis mortigita, sed li ne foriris el mia penso. Kontraŭe, prezentiĝas senĉese en mian memoron lia naŭva rideto, lia agrabla interparolado dum la tempo kiam mi kulturis en

li la esperantan semon enigante samtempe la internan ideon de Esperanto tiel bone komprenitan kaj defenditan de nia bonanima samideano.

Antaŭ la konscienco de la mortiganto kaj instigantoj, kiuj ajn ili estu, ludos teruran dancon kruelaj fantomoj ne permesante ripozon al la kulpulo.

Infanoj sen patro, familio senhelpa estas la rezultato de tia abomeninda hombatalo kies finon oni ne vidas.—E. ARTIGAS.

AL LA FRATECANOJ

«Nia Vivo» estis deziro esprimita de la Fratecanoj dum multe da tempo kaj efektivigita de entuziasma aro da ili; ili studis kaj solvis la malfacilaĵojn prezentitajn en ĝia efektivigado, kaj Frateco, per sia Komitato, donis al ĝi ekonomian vivon, pagante la elspezojn de ĝia presado.

La ideoj de iuj ebligis la aperon de «Nia Vivo», sed, ĉar, ĝi estas la deziro de ĉiuj, ĝi ne devas nur ricevi la verkojn de tiuj malmultaj anoj, ne, ĉiuj devas alporti sian klopodon, por ke «Nia Vivo» ne elportu dekadencan kaj lacecon pro la laciĝo de tiuj kiuj ĉiam laboras. Mi jam scias ke multaj fratecanoj, tiel oni diris al mi, ne kuraĝas fidi pri sia esperanta entuziasmo, supozante ke, ilia penado donus tiel malgrandan rezultaton ke ili timas riĉindiĝi; tiu ĉi timo estas infana, ne devas ekzisti, ĉar donante ĉiu el ili tion kion ili povos, jam plenumos sian devon; pro tio mi memorigas tiun paroladon «elparolitan» de Salomono al la bestaro (kiam la bestaro parolis sed «ne elparolis»), kiam li petis al ĝi kunhelpon por starigi sian belan palacegon. Salomono pripensis pri tia ideo kaj petis helpon al la bestoj, ĉar, per la solaj fortoj de la homoj li ne povus entrepreni tian grandan laboron.

La bestaro plenumis sian devon; la ursoj, la bovoj, la gado, la sardelo, k. t. p., kaj ankaŭ . . . la formiko. La formiko alvenis la lasta, trenante «malgrandetan sableron».

La moko ekĝeneraligis ĉe la bestaro pro la «grandega» kunhelpo donita de la formiko. La reĝo Salomono silentigis la ridojn per tiuj ĉi vortoj: «Dankon al ĉiuj miaj bonfarantaj bestoj; dankon al ĉiuj pro via sindona kunhelpado; sed dankon specialan, «eta formiko», ĉar, per via helpo, vi plene montris ke ĉiu povas «laŭ siaj fortoj» kunhelpi iun ajn aferon; vi, estas vere, alportis nur malgrandan sableron, sed oni ne forgesu ke «tiel aginte vi plenumis vian devon», kaj ke multaj sableroj faras aron, aŭ eĉ aregon».

Tial, konjektitaj «etaj formikoj», almetu sur vin la salomonan rakonton, kaj ĉiu el vi plenumos sian devon.

E. BRUQUETAS.

NE KOMPLIKU ESPERANTON!!

La eksterordinara simpleco kaj facileco de la Zamenhofa lingvo estas sendiskute unu el la plej gravaj kaj logaj kaŭzoj. kiuj forte altiras kaj enkondukas multegajn personojn al la esperantigado.

Estas ja, treege konate ke, kiam unuafoje malfermas lernolibron esperantan iu individuo, kaj komencas tralegi ĝiajn paĝojn, subite ekkrias

gaje: Ho, ĉi tio estas bela, facila lingvo, mi studos ĝin!

Ĉar, kara leganta amiko, estas certa fakto, certa fakto, ke se nia fleksebla, belsona, internacia idiomato estus tiel malfacila. tiel malsimpla kaj tiel malfacile elparolebla, kiel la nacilingvo franca, angla aŭ germana, supozeble ĉe niaj vicoj ne havus ni tiom da konvinkitaj samideanoj.

El tio, kion mi skribas oni povas konkludi ke ankaŭ ĉio kaj super ĉio necesas konservi pure nian amatan lingvon respektante la dek ses gramatikajn regulojn kaj penante eviti la troegan trudon de kelkaj vortoj, kies unika utileco estas vane dikigi la Vortaron.

Por pruvi ke ekzistas en Esperanto sentaŭgaj radikvortoj, mi montras al la leganto la jenajn okazojn.

La multivalora Vortaro de Inglada kaj Villanueva la hispanan vorton: «abdicar» tradukas tiel: «cedi, forlasi, demeti la reĝecon, eksreĝigi».

Ĉi tiuj tradukoj, laŭopinie de la modesta aŭtoro de tiuj ĉi linioj, perfekte signifas kaj tradukas la vorton «abdicar».

Nu, mi demandas: Kial uzi en la internacilingvo la tuteneutilan vorton «abdiki»...

Alia ekzemplo: Por traduki la vorton «siglo» oni faras *jarcento* (jaro kaj cento); tial se la logiko ne mensogas, oni devus esperanten traduki la hispanan vorton «hectógramo», tiel *gramcento*. Ĉu ne ĝi estas prava? Do, ree, mi demandas: Kial, geamikoj, uzi en la mondlingvo la formon *hektogramo*? por esprimi *centon da gramoj*?... Mi ne atingas kompreni tion.

Tiel, kiel la cititaj ekzemploj ekzistas esperante miloj kaj milionoj da ili.

Kaj nun, timante pro la amplekso de l'artikolo, mi finas per la sekvantaj frazoj:

—Gekamaradoj: Pro la sankta idealo, pro la nova sento, pro la homama afero: Ne kompliku Esperanton!!...

JOSÉ LÓPEZ ROS.

Jaén.

Esperantistoj! En nia klubo FRATECO, ĉiutage vespere, de la 7.^a ĝis la 9.^a ni atendas vin, dezirante interparoli esperante kaj pitrakti diversajn aferojn, rilate al nia Societo kaj al la esperantista movado.

La Asocio de ŝoforoj poliglota fondita en Parizo, en sia lasta kunveno decidis uzi nur Esperanton en siaj rilatoj kun fremdaj landoj.

La devizo de la Esperantista Rendevuejo de Parizo, estas: «Nur unu volo, nur unu devo: Uzi Esperanton, porti la stelon.

LASTA HORO

En la venonta monato ĉeestos en Saragoŝo la Delegitoj de la Federacioj katalana, valencia, astura kaj vasca por starigi la HISPANAN KONFEDERACION.

Ni kore salutas ilin je la nomo de «FRA-TECO», kaj deziras ke ilia ĉeesto ĉe ni estu agrable kaj ke ili plenumu kaj atingu plene sian celon.

RETROVIDO

Dum la lasta tempo de la politeismo, kiam poste Moizes starigis la monoteismon, kaj en la malproksima orienta lando de la Irán, kiu etendiĝas ĝis la Bactriana kaj bordoj de la Yudo, okazis stranga ajo.

En la urbeto Kadekas kaj dum la tempo de Moizes ekzistis la familio Kafis, du fratoj kun iliaj respektivaj gefiloj.

Balac la plej aĝa, estis tre fervora politeisto, kaj lia frato Aamón amis la monoteismon, ĉiam estis disputoj ĉe ili, neniam ili konvinkiĝis pri la boneco de siaj respektivaj doktrinoj, kaj la atakoj estis ĉiufoje pli kaj pli akraj, pro la doktrinoj, reciproke ili akceptis la ofendojn al la ismoj; sed okazis ke iun tagon Balac ofendis la pastron Aarón propagandiston de la monoteismo, kaj Aamon kiu konsentis la atakon por sia kredo, senproteste; ofendis al politeista pastro. Post la ofendo estis atako kaj finfine la du restis vunditaj grave, mal multe da tempo poste ambaŭ mortis. Dum la enketado iliaj gefiloj pruvis ke la verecoj de la batalo estis la atako al la religiaj pastroj.

La batalintoj lasis flanken iliaj doktrinojn kaj bataladis kiam oni ofendis la personojn, por ili, blindaj fanatikuloj, estis pli puraj la personoj ol la doktrinoj.

Nuntempe okazas tute same kiel dum pratempo; en Esperanto okazas tute same kiel en sociaj ismoj, ekzistas esperantistoj kiuj preskaŭ ne defendas esperanton kontraŭ ĉies atakoj kaj tamen ili defendas la personojn, ĉar ili konsideras ke estas pli defendinda esperanta gvidanto ol Esperanto mem.

Kiam la tuta homaro agas tute logike defendante la ismojn anstataŭ la personojn, ĝi meritos la nomon de vera Homaro, la homoj ne plu estos tiom mizeremaj kiom antaŭ-metos personismon aŭ pura doktrino.

Por fini mi pensas, kiam grandecon havos Esperanto kiam ĉiuj esp-istoj laboros esperantisme, anstataŭ personisme, tiam ricevos la veran nomon de *Esperantio*.

Madrid, Septembro 1931.

JOSÉ LERROUX.

EKSTERLANDA KUNLABORADO

Nia kara samideano Constant Martín, instruisto kaj delegito de V. F. A. en Tronget (Francio), verkis por NIA VIVO la belegan artikoleton kiun ĉi malsupre ni tre danke publikigas.

AMO

La supera leĝo, kiu resumas ĉiujn aliajn leĝojn kaj el ni faras vere homojn estas la leĝo de amo! «Amu vin unu la alian»; en tiu frazo estas la vorto de la mondo kaj ĝia savo.

La malbono estas ke oni ne sufiĉe amas sin reciproke. La homoj malamas, trompas, malbonigas, turmentas, insultas, detruas unu la alian.

Por obei siajn gepatrojn oni devas ilin ami; por eduki kaj varti siajn infanojn; oni devas ilin ami. Amon oni bezonas por instrui la lernantojn, por pardoni la kulpojn kaj por ripari ilin. Ankaŭ amon, tiel multe kiel sciencan, oni bezonas por flegi la malsanulojn.

Sen amo kaj boneco, la vivo estas malvarma, egoista, seninteresa kaj fine kondukas al la tedo de ĉio. Kun la boneco, malfacilajo fariĝas facilajo; mallumajo fariĝas lumajo; la vivo akiras ĉarmon kaj eĉ ĝiaj mizeroj plidolĉiĝas. Se ni scius, kian povon havas la boneco, per ĝi ni aliformigus en paradizon tiun mondon kiu, sen ĝi, estas infero.

Amo feliĉigas; malamo malfeliĉigas. La plej danĝera malamiko de l' homo estas lia egoismo. La amo estas la libera kaj vasta ĉielo, kie la animo povas malvolvi siajn flugilojn.

Ni do, frue, lernu interesiĝi pri io alia ol ni mem.

CONSTANT MARTÍN.

RESPONDO

Pri mia verkaĵo «En kiu jarcento ni vivas?» publikigita en la antaŭa numero de NIA VIVO, mi ricevis leteron, kiun mi respondis per la jeno: «S-ro. Jaume Grau Casas - Direktoro de «Kataluna Esperantisto»—Kara samideano: Mi ĵus ricevis vian leteron de la 21^a de la nuna monato kiun mi respondos amplekse tuj kiam la libertempo permesos al mi. Nune, nur tiujn vortojn: Mi intencis ĝeni neniun. Se vi kaj aliaj, pro ne kompreni la veran tendencon de miaj vortoj, ĝeniĝis, mi multe bedaŭras kaj petegas al ĉiuj koran pardonon.—Mi finas ripetante frazon publikigitan ĉe la malfeliĉa artikolaĉo: «Mi plezurege perdus mian kastilan lingvon se iun tagon ni, ĉiuj, leviĝus parolante unikan lingvon... la katalunan...»

Nove pardonon kaj estu certa pri la alta estimo de via sindonema.»

JOSÉ ORÓS.

LA MAGIA KRUĈO

(FINA POPOLFABELO)

Malriĉa terkulturisto plugis sian kampon. Fininte sulkon, la plugilo-kiu estis el ligno-tusis malmolan objekton kaj rompiĝis. Tio estis granda argila kruĉo. Volante iel kompensi la difekto de l'plugilo, la kamparano forportis hejmen la kruĉon. Li rakontis la malfeliĉon al sia edzino, kiu tuj komencis kriegi kaj ĥinsulti lin, kvazaŭ la mizerulo estus kulpa je la okazintaĵo.

La kamparano pretiĝis por iri al la halo. Preterirante antaŭ la kruĉo, lasis fali en ĝin kelke da moneroj. Li elprenis ilin kaj vidis ke en la kruĉa fundo troviĝis denove egala kvanto da moneroj. Duafoje eligis tiujn monerojn kaj rimarkis ke en la fundo ĉiam restas egala nombro da moneroj. La kamparano komprenis ke la kruĉo estas magia kaj havas la mirindan econ reprodukti senĉese ĉion kion oni elprenas el ĝi. Tiamaniere la terkulturisto riĉiĝis. Li ordonis al sia edzino ke ŝi al nenin diru ion pri la okazintaĵo, kaj la virino jurpromesis gardi silenton.

Baldaŭ ŝi ne povis silenti kaj rakontis ĉion. Sciigis pri tio homo posedanta kampon apud tiu de la riĉiĝinta kamparano, kaj pledis kontraŭ ĉi tiu dirante ke la kruĉo estis trovita en sia bieno. La juĝisto aŭskultis ambaŭ pledantojn, kaj bone informite pri la afero, konfiskis la kruĉon kaj forpelis la du pledantojn. La terkulturisto kaj la najbara bienulo plendis amare tra la tuta vilaĝo pri la monavido de l'juĝisto. Poste la patro de la juĝisto, irante hejmen, aŭdis kion oni diris pri la filo, serĉis lin kaj reciproĉis lian konduton dirante: —Mi tute ne komprenas, kara filo, kiel pro mizera argila kruĉo vi senhonorigis vin. Tiam la juĝisto: —Sed konsideru, mia patro, ke ne temas pri ajna kruĉo. Venu kaj vi vidos ion mirindan.

Li alkondukis sian patron antaŭ la kruĉon kaj al li klarigis ĝian mirindan econ. Sed apenaŭ li finis la klarigon, jam la patro rigardadis la kruĉan fundon, rapide ĵetante tutan sian monon en ĝin kaj elprenante monerojn ambaŭmane. Tiom sin klinis la maljunulo, ke li falis internen. Tuj alkuris la filo por eltiri sian patron el la kruĉo. Sed kiam li eltiris lin, aperis sur la fundo alia tute egala maljunulo. Li eltiris lin ankaŭ kaj baldaŭ vidiĝis tria maljunulo, tria patro, al kiu la juĝisto nepre devis fari saman servon kun respekto kaj amo. Eliginte la trian patron, la juĝisto vidis kvara maljunulon sur la fundo dolore baktantan. Kaj la malbona juĝisto tute senespere vidis ke depost tiam li vole ne vole devis eltiri nun sia tuta vivo patroj el la kruĉo aŭ ne plenumi siajn plej sanktajn fildevojn.

JOSÉ MARTÍNEZ.

SCIIGOJ

Loterio.—En tiu ĉi jaro, tiel same kiel en la pasinta, FRATECO aĉetos por siaj gesocietanoj, 2.000 pesetojn en unu numero de la Kristnaska loterio kaj eldonos partojn po unu peseto. Ni sciigas ĝin al niaj gekunsocietanoj por ke tiu kiu volos ludi, diru ĝin al nia kasisto por eviti tion, kio okazis la antaŭan jaron ke kelkaj el la lastaj petintoj ne povis aĉeti ĉiom kiom ili volis.

NIA VIVO.—Al multaj demandantoj pri la abonprezo de nia monata bulteno, ni sciigas ke ĝi estas por niaj gesocietanoj al kiuj estas disdonata senpage, kaj ke FRATECO havas por tiuj kiuj loĝas ekster Zaragoza, la anecon kiel «korespondanda ano» kies jara kotizo estas du pesetojn. Aliĝu, do, al FRATECO. Tiel vi ricevos NIA VIVO; vi helpos nian esperantan agadon kaj, se vi estas multaj, eble nia Bulteno... sed ni nenion oferas. Nur ke niaj novaj korespondaj anoj ricevos senpage la publikigotajn numerojn de la nuna jaro. Tio estas: ke la aneco komencos de januaro proksima.

Por la familio de S-ro Floría.—«Frateco» malfermis monkolekton por la familio de nia malfeliĉa samideano. Ni publikigos, laŭ la liberloko permesos al ni, la nomojn de la donintoj. Jen la unuaj:

Grupo «FRATECO», 50 pesetas; don I. Achón, 2; don M. Maynar, 25; don E. Bruquetas, 10; don L. Til, 4; don F. Turrión, 15; don R. de Salas, 25; don A. Esteban, 5; señorita E. Modrego, 5; señorita J. Bueno, 5; señorita P. S. 2; señorita A. A. 2; don R. Gastón, 25; don E. Valero, 2; don J. González, 25; don E. Artigas, 5; don J. Larruga, 5; don J. Simón, 5; don P. Conejero, 4; don S. Gabás, 2; don P. Ibañez, 1; don E. Casasnovas, 5; señorita M. Casasnovas, 5; don J. Orós, 15; don E. Barrachina, 5; señorita A. Bueno, 2; don F. Juncadella, 1'50; don C. Bacarizo, 5; don L. Theus, 1; señorita P. Arribas, 5; señorita L. Bernal, 5; don M. Ollala, 1; don R. Fernández, 4; don C. Pérez, 5; don P. Marqueta, 3; don P. Martínez, 5; don J. Uñez, 5; Esperanta Rondeto «Artemo», 10; don V. Turrión, 25; don L. Borruey, 10; don R. Gran, 5.

(Daurigota).

Izolita esperantisto faras por nia celo tiom kiom se li ne estus Esperantisto. Li devas, do, esti ano de iu ajn Esperanta Societo.